INFO-esperanto

Órgano informativo en español sobre el idioma internacional esperanto Nº 6-2008
Para ser reenviado también a personas e instituciones no vinculadas con el idioma creado por Lázaro Ludovico Zamenhof
Redacción: **Alfredo Portillo** (alportillo@ula.ve) Mérida – Venezuela

Afrika vojo al ekonomia integriĝo *
El camino de África a la integración económica *

La 22-an de oktobro en Kampalo, la ĉefurbo de Ugando, kolektiĝos 26 ŝtatestroj aŭ registaraj ĉefoj de la tri afrikaj regionaj ekonomiaj organizoj, Orient-Afrika Komunumo, Komuna Merkato por Orienta kaj Suda Afriko, Sud-Afrika Disvolva Komunumo. Ili ĉeestos al pintkunveno de la tri organizoj por diskuti pri la afrika ekonomia integrigo kaj la celo de Afrika Ekonomia Komunumo. Oni opiniis, ke la atingo de tiu ĉi celo liveros avantaĝon al la komerco inter afrikaj landoj kaj aldonos ŝancon por ilia disvolviĝo. Tamen specialistoj avertis, ke la vojo al la ekonomia integrigo estas ne ebena, sed plena de dornoj kaj defioj.

La tri ĉefaj ekonomiaj organizoj de Afriko konsistas el 26 membroj, duono de afrikaj landoj. Tiuj ĉi landoj okupas ĉirkaŭ 60% de la afrika loĝantaro kaj ilia pokapa malneta enlanda produktvaloro proksimiĝas al 1 200 usonaj dolaroj. John Mugerwa, plenuma sekretario de la uganda ŝtata sekretariejo, diris, ke tio estas tre larĝa merkato plena de komercaj ŝancoj; se la tri ekonomiaj organizoj unuiĝos, la merkato kelkoble grandiĝos; iuj regionaj ekonomiaj potencoj, ekzemple Sud-Afriko, Kenjo, Egiptio, Libio kaj Bocvano, apartenas al malsamaj ekonomiaj organizoj, tamen unuigo de la organizoj asocios la ekonomiajn potencojn kaj fortigos la Afrikan Ekonomian Komunumon.

John Mugerwa emfazis, ke ankaŭ afrikaj landoj povas kompletigi unu alian; ekzemple, Sud-Afriko, la afrika ekonomia kondukanto, forte disvolvas altteknologion, dum Kenjo, kiu tenas prosperan agrikulturon, tamen estas postiĝinta en la industrio, urĝe postulas disvolvi industrion de la informa teknologio, tial evidentiĝas la interkompletigeco inter la du landoj; tamen ili apartenas al malsamaj regionaj organizoj, kaj tio multe ĝenas la komercon inter ili, kaj efektivigo de liberkomerco certe povas akceli ekonomian disvolvon de la du landoj.

Antaŭ nelonge, Charles Gasana, prezidanto de la Akordiga Komitato de la Orient-Afrika Komunumo, diris, ke por akceli la propran ekonomian disvolviĝon, afrikaj landoj ne devas tro multe sin apogi sur ekonomiaj helpoj de okcidentaj landoj, sed devas intensigi la komercon inter si, tial por Afriko la plej efika vojo al la ekonomia integriĝo estas iom post iom sin liberigi el la helpoj de okcidentaj landoj.

Sed oni opiniis, ke unuigo de la tri ekonomiaj organizoj estas tre malfacila; kaj la plej granda defio venis el la multtavoleco de statusoj de membrolandoj de la tri organizoj. En la Komuna Merkato por Orienta kaj Suda Afriko estas 4 membrolandoj, kiuj samtempe apartenas ankaŭ al la Orient-Afrika Komunumo, kaj aliaj 8 apartenantaj ankaŭ al la Sud-Afrika Disvolva Komunumo. La vojo al la ekonomia integrigo restas longa, kaj afrikaj landoj devas flanken meti disputon kaj kune klopodi por atingi la celon.

* Ĉina Radio Internacia en Esperanto
http://esperanto.cri.cn/161/2008/10/21/1s87697.htm

El 22 de octubre, en Kampala, capital de Uganda, se reunirán 26 jefes de Estado o de gobierno de las tres organizaciones económicas regionales de África: La Comunidad de África Oriental, el Mercado Común para África Oriental y del Sur y la Comunidad para el Desarrollo de Sudáfrica. Ellos asistirán a la cumbre de las tres organizaciones para discutir sobre la integración económica de África y sobre la Comunidad Económica Africana. Se considera que el logro de este objetivo se traducirá en ventajas para el comercio entre los países africanos y aumentará las oportunidades para su desarrollo. Sin embargo, algunos especialistas han advertido que el camino para la integración económica no está despejado, sino lleno de espinas y desafíos.

Las tres principales organizaciones económicas de África agrupan a 26 países africanos, el 60% de la población de ese continente y su producto interno bruto per cápita se aproxima a 1200 US$. John Mugerwa, secretario de la Secretaría de Uganda, dijo que esto representa un amplio mercado con muchas oportunidades para el comercio. Si las tres organizaciones económicas se unen, el mercado se ampliará considerablemente. Algunas potencias económicas regionales, como Sudáfrica, Kenya, Libia y Botswana, pertenecen a diferentes organizaciones económicas. Sin embargo, la unión de estas organizaciones provocará una asociación de esas economías y fortalecerá la Comunidad Económica Africana.

John Mugerwa enfatizó que los países africanos pueden complementarse unos a otros. Por ejemplo, Sudáfrica, el líder de la economía africana, ha desarrollado fuertemente la alta tecnología, mientras que Kenya, que cuenta una agricultura próspera, está retrasada en la industria, y requiere con urgencia desarrollar la industria de la tecnología de la información. Así se evidencia la complementariedad entre lo dos países. Sin embargo, ambos pertenecen a diferentes organizaciones regionales, y esto afecta el comercio entre ellos, pero el libre comercio ciertamente puede acelerar el desarrollo económico de los dos países.

Recientemente, Charles Gasana, presidente del Comité de Acuerdo de la Comunidad de África Oriental, dijo que si los países africanos quieren acelerar su propio desarrollo económico, no deben apoyarse demasiado en las ayudas económicas de los países occidentales, sino que deben intensificar el comercio entre ellos, por lo que el camino más eficaz para la integración económica de África, es liberarse poco a poco de las ayudas de los países occidentales.

Se considera que la unión de las organizaciones económicas es muy difícil y el mayor desafío proviene de la variedad de estatutos de los países miembros de las tres organizaciones. En el Mercado Común para África Oriental y del Sur hay cuatro países miembros que al mismo tiempo pertenecen a la Comunidad de África Oriental, y otros ocho a la Comunidad para el Desarrollo de África del Sur. El camino para la integración económica es largo y los países africanos deben dejar a un lado las disputas y juntos procurar alcanzar el objetivo.

* Traducido del esperanto por Alfredo Portillo